**N I A V O Ĉ O**

**Madrida Esperanto-Liceo**

San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz APRILO 1999

Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo:
http://www.ciudadfutura.com/esperanto

**ESPERANTO EN AMAS-KOMUNIKILOJ**

Denove aperis vinjeto, desegnita de Chummy Chúmez, en tiu okazo estis en Diario 16 (1999-03-06)
En "Ciberpaís", la informatika suplemento de "El País", je 18 Marto pasinta, aperas nova aludo al Esperanto. Ŝajnas ke tiu suplemento estas la nura ero de "El País" kie nia lingvo estas plurfoje menciata.

**JORGE CAMACHO**

Ekde marto Georgo translokiĝis al Madrido, li loĝis en Bruselo kiel interpretisto de finna lingvo ĉe Eŭropa Unio. Feliĉe por la Madrida esperanto movado li laboros en Madrido, ni esperas ke almenaú kelkfoje li vizitos nian konversacian rondon kaj madridaj esperantistoj povas profiti lian bonegan lingvo-nivelon. Kaj ke ankaŭ Miguel Fernández alportos sian scion al la madrida esperanto-movado, same kiel dum la ĉeesto en Madrido de geedzoj Fighiera kiuj altigis la nivelon en la Liceo ĉar ili regule partoprenis en nia parolado.

**58-a HISPANA ESPERANTO KONGRESO** Castellón inter la 17-a kaj la 21-a de julio.

***http://personal.redestb.es/a-casquero***

Gxis nun jam konfirmis sian partoprenon la jenaj prelegontoj:

1.- Rudolf Fischer. Universitato de Münster (Germanio).""La lukto de la Germanoj trovi novan nacian identecon en internacia mondo."
2.- Kris Long. Britio."Pri la angla poeto Gerard Manley Hopkins"
3.- Olga Kerziouk. Ukrainio."La brita biblioteko: historio kaj trezoroj"
4.- Hetwig Fischer. Germanio."Ferakontoj de diversaj popoloj"
5.- David Galadí. Universitato de Barcelona."Astronomio"
6.- Miguel Angel Sancho. Madrid."Esperanto en Internet"
7.- PENG Zhengming. Cxinio."Cxina literaturo"

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ**

10-a Kongreso de Valencia Esperanto Federacio kaj Murcia. 17-18a aprilo. Lorca (Murcia)
51a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto Federacio. 8a-15a majo. Le Mans (Francia)

**HEF invitas al ĉiuj madridaj esperantistoj kaj simpatiantoj viziti la budon, kiun prezentos ĉe EXPOLINGUA, en la foirejo**

**de la Casa de Campo inter la 22a kaj la 25a de aprilo. (10-20.00 horo)**

Por adekvate informi al la publiko en EXPOLINGUA la C.O. de HEF bezonas scii en kiuj urboj nun okazadas esperanto-kursoj. Bonvolu informi antaŭ la 21-a de aprilo



### HEF ANGULO

**Lunde** kaj ĵaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3º-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson 91 446 80 79. Ankaŭ e-poŝto: *admin@esperanto-es.org*

**EXPOLINGUA**: De la **22a ĝis la 25a de aprilo** HEF, kunlabore kun MEL, partoprenos en la foiro kiu ĉiujare altiras al Madrido plurajn milojn da homoj kun intereso pri lingvoj. La celo estas en nur informi la publikon pri esperanto, sed ankaŭ krei prozitivan etoson rilate la lingvo. HEF informos pri si mem kaj pri la Manifesto de Prago, diskonigante samtempe la ekziston de kursoj kaj aliaj aktivaĵoj. Pere de komputilan sistemon HEF prezentos siajn novajn TTT-paĝojn en interrrreto kaj TV-magnetoskopo montros la video-kurso “Mazi en Gondolando”.

**BUSKARAVANO AL BERLINO**

Grupo Esperanto de Valencia organizas vojaĝkaravanon al la Universala Kongreso de Esperanto en Berlino(Germanio), inter la 29**-a de julio kaj la 13-a de aŭgusto.** La vojaĝo okazos per moderna kaj komforta aŭtobuso. La prezo kun loĝado en dulitaj ĉambroj, ĉiam en urbocentroj (ankaŭ en Berlino kun apartamentoj 3/5 litoj), estos entute ĉirkaŭ 90.000 pesetoj, se aliĝas pli ol 23 homoj. Oni akceptos maksimumon de 35 vojaĝantoj. Post la 5-a de majo 5.000 pesetojn pli. Por tiuj kiuj ne deziras vojaĝi per la aŭtobuso, oni disponigas ĉambrojn en Berlino por 4.200 pesetoj persono-nokto, en dulita ĉambro, en la urbocentro de Berlino, ĝis kiam jam ne restos pli da liberaj litoj en la hotelo. Tiuj kiuj deziros unulitan ĉambron devos pagi aldonan sumon.

Pli da informojn petu al Augusto Casquero. Telefonnumero 96 3401369, (21,00-22,00 horoj).

### VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Ni kunvenas, lunde ekde la 18.30 h en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

**Prelego:** 12-an de aprilo “Iberaj pejzaĵoj: Andaluzio”. Komentitaj lumbildoj

9an de aprilo “Birmania, el país de la sonrisa”. Lupe projekcios lumbildojn kaj komentos hispane, ĉe Casa de Guadalajara. Plaza de Santa Ana 15, je la 20.00 horo.

**Kursoj**:**Centro Cultural "Maestro Alonso"** (kvartalo Ventas).

Baza kurso, merkrede 18.30 ĝis 19.300. Profesoro Antonio Tur

Supera kurso, merkrede 19,30 ĝis 20,30. Instruas Carmen Suárez

**Centro de Día Puente de Toledo**. Mercedes Arteaga 18. Por triaaĝuloj lunde matene.

**BAZAN KURSON**, ekde la 3a de majo, dum 5 semajnoj, lunde kaj jaŭde (18,00-20,00h). Prezo 9.500 pesetojn, inkludas libron. Profesoro: instruas Juan del Castillo. REZERVU LOKON **HEF-Oficejo** RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::
::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::